



**Esperanto  
Societo  
Frankfurto**

**junio 2014**

Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main e.V.  
gegründet 1904 – fondita 1904

## ESPERANTO INFORMILO

Esperanto-  
Gesellschaft  
Frankfurt am Main

[www.esperanto-frankfurt.de](http://www.esperanto-frankfurt.de)

1. Vorsitzende:  
Katarina Eckstädt  
Geschwister-Scholl-  
Str. 1  
63486 Bruchköbel  
Tel. 06181 76343,  
e-mail:  
[ke.esperanto@t-online.de](mailto:ke.esperanto@t-online.de)

**Bankverbindung:**  
Esperanto-Gesell-  
schaft Frankfurt /M.  
**IBAN: DE75 5008 0000**  
**0771 5717 01**  
**BIC: DRESDEFFXXX**  
Commerzbank  
Frankfurt/Main

**Beitrag:**  
mit DEB-Beitrag  
80 €  
Familienmitglied  
40 €  
Nur ESF: 20 €  
Familienmitglied  
10 €

## SOMERA FESTO



foto:ke

Ni jam festis en la jaro 2010 la someran feston ĉe la familio McMahon.  
Nun ili invitis nin denove al Marburg-Cappel

**einladung zum klubabend**

**invito al la klubvespero**

Bürgertreff Bockenheim  
Schwälmer Str 28  
Frankfurt am Main

**donnerstag, d. 5.6.2014**

**ĵaŭdon, la 5an de junio 2014**

Liebe Mitglieder, Freunde und Interessenten,  
wir laden Sie zum nächsten Klubabend ein, der am Donnerstag, den **5. 6. 2014** stattfinden wird.

Karaj membroj, geamikoj kaj interesiĝantoj,  
ni invitas vin al la venonta klubvespero, kiu okazos ĵaŭdon, la **5an de junio 2014**.

**18.30 h**

**SPRACHRUNDE**

**LINGVA RONDO**

**Transitiveco de verboj en Esperanto**  
**Ulli Fellmann**

**19.30**

**Serbaj monaĥejoj**



foto:ke

**GRAČANICA, 14.Jh**

Serbio posedas multajn monaĥejojn el la mezepoko. Ili estas tre konataj pro siaj freskoj. Ili transvivis 5 jarcentojn de turka okupado, dum kiu ofte iliaj tegmentoj de la kupoloj estas deprenitaj kaj ili estis malŝirmitaj kontraŭ la vetero. Gračanica estas konata pro sia arkitekturo.

**SERBISCHE KLÖSTER**

Serbien hat viele Klöster aus dem Mittelalter. Sie sind wegen ihrer Fresken sehr bekannt. Sie haben 5 Jahrhunderte der türkischen Besatzung überlebt, die Zeit, in der man oft die Dächer der Kuppeln abgenommen hat und sie so ungeschützt dem Wetter ausgesetzt hat. Gračanica ist wegen seiner Architektur bekannt.

**donnerstag, den 19.6.2014**

**ĵaŭdon, la 19an de junio 2014**

**Ne okazos pro la festotago**

# SOMMERFEST

findet statt am

okazos

**Samstag, den 14. Juni    Sabaton, la 14an de junioo**

(ca. 14-19 h) im Garten der Familie  
Perlwitz/McMahon in

**Marburg-Cappel,  
Im Lichtenholz 21**

(de ĉ. 14-19 h) en la ĝardeno de la familio  
Perlwitz/McMahon en

**Marburg-Cappel,  
Im Lichtenholz 21**

Parkplätze befinden sich vor dem Haus.

Parkejo ekzistas antaŭ la domo

## **Anfahrt:**

### **Mit Auto:**

- Autobahn 3a von Gießen nach Marburg
- Ausfahrt Marburg-Süd.
- Folgen Sie den Zeichen „Polizei“ und „Ärztlicher Notdienst“
- gleich links über eine Ampelkreuzung
- die nächste Einfahrt, vor der Fußgängerbrücke, rechts.

### **Mit Zug:**

Frankfurt/M Hbf ab 12:31h, Gleis 16.

Ankunft Marburg-Süd 14:09 h.

Die Abholung erfolgt, wenn die Gastgeber vorher verständigt wurden.

Tel. **06421 44755**

Direkt vor dem Südbahnhof ist eine Bushaltestelle. Linie 2 oder 3 nehmen, die 3. Haltestelle aussteigen, über die Straße gehen, den Berg hoch. Die zweite Straße links führt Sie zum Ziel.

### **Grillen:**

Grillgerät und Getränke aller Art (gegen Bezahlung) werden gestellt. Grillgut für Eigenbedarf bitte mitbringen, ebenso Salate aller Art, die dann gemeinsam verspeist werden.

### **Kuchen:**

Nach dem Grillen schmecken auch Kuchen. Wer bringt welche Kuchen mit? Bitte melden bei Fr. Eckstädt.

**Bei Regen findet das Fest auf der Terrasse oder in der Wohnung statt.**

## **Alveno:**

### **Per aŭtomobilo**

- Aŭtoŝoseo 3a de Gießen al Marburg
- elveturejo Marburg-Süd. Sekvu la signojn „polico“ kaj „kuracista servo por urĝaj kazoj“.
- tuj maldekstren trans stratokruciĝo kun semaforo
- sekvanta enveturejo, antaŭ la ponto por piedirantoj, dekstren.

### **Per trajno:**

Ekde Frankfurt/M Hbf ab 12:31h, kajo 16.

Alveno Marburg-Süd 14:09 h

La akcepto okazos, se la gastigantoj ricevis antaŭe informon.

Telefono: **06421 44755**

Antaŭ la stacidomo estas bushaltejo. Uzu linion 2 aŭ 3, forlasu la buson ĉe la 3. haltejo. Iru trans la strato sur la monton. La dua strato maldekstren estas la celo.

### **Kradrostado:**


Kradrostilo kaj ĉiuspecaj trinkaĵoj (kontraŭ pago) disponeblas; viandon aŭ kolbasojn por la propra uzo bonvolu kunpreni, same diversajn salatojn, kiujn ni poste kune manĝos.

### **Kukojn:**

Post la kradrostado gustas ankaŭ kukoj. Kiu kunportos kiujn kukojn? Ni petas, anonci tion al sino Eckstädt.

**Se pluvas, la festo okazos sur la teraso aŭ en la loĝejo.**

# SOMERA FESTO



Auf der Karte sind vier Orientierungspunkte eingetragen. Wir hoffen, sie helfen Ihnen.

Sur la mapo troviĝas kvar orientiĝaj punktoj. Ni esperas, ke ili helpas al vi.

„Eine Sprache für alle? Vor- und Nachteile einer Verkehrssprache und der Sprachenvielfalt“. Zu diesem Thema diskutierten am 7. Mai die Professoren Jürgen Trabant und Jürgen Gerhards sowie der Europaabgeordnete Michael Gahler. Drei Mitglieder unserer Gesellschaft haben sich die Podiumsdiskussion im Goethehaus angehört.

Während Prof. Trabant ein ausgesprochener Verfechter der Sprachenvielfalt ist, sieht Prof. Gerhards darin keinen Wert und forderte in der Diskussion, die Rolle des Englischen weiter zu stärken. Herr Gahler nahm eine moderatere, pragmatische Position ein. Allerdings waren in einer Hinsicht die Positionen gar nicht so weit auseinander. Alle, auch Trabant, sahen keine Alternative zur Verkehrssprache Englisch und sprachen sich deshalb für einen verstärkten Englischunterricht aus. Die Sprachenvielfalt sieht Trabant als Kulturgut, den Aspekt der Sprachengerechtigkeit brachte er nicht. Das Stichwort der Gerechtigkeit kam vielmehr von Gerhards, jedoch mit der Argumentation, mit mehr Englisch, z.B. im Kinderkanal des Fernsehens, zu verhindern, dass weniger gebildete Kreise von der internationalen Welt abgehängt werden. Gahler hatte an dieser Stelle nur die Konkurrenz des Deutschen gegenüber dem Französischen im Blick.

Bei den Fragen aus dem Publikum beteiligten sich zwei der ESF-Mitglieder. Gezielt auf Esperanto angesprochen, waren die Diskutanten einhellig der Meinung, dass es chancenlos sei, weil keine Macht dahinterstehe. Trabant habe sich einmal für Latein eingesetzt, sah dafür aber auch keine Chance. Die andere Frage betraf den Umgang mit der bevorzugten Stellung der Englisch-Muttersprachler. Gerhards schlug eine finanzielle Kompensation in der EU vor, sah zugleich aber keine große Chance, diese durchzusetzen. Die anderen äußerten sich ähnlich.

Reinhard Pflüger

„Unu lingvo por ĉiuj? Avantaĝoj kaj malavantaĝoj de interkomunika lingvo kaj lingva diverseco“. Pri tiu temo diskutis je la 7-a de majo la profesoroj Jürgen Trabant kaj Jürgen Gerhards kaj la eŭropa deputito Michael Gahler. Tri membroj de nia asocio aŭskultis la podian diskuton en la Goethe-Domo.

Dum prof. Trabant estas klara favoranto de lingva diverseco, prof. Gerhards ne vidas valoron en ĝi kaj postulis en la diskuto plu fortigi la rolon de la angla. S-ro Gahler poziciis sin modere kaj pragmate. Tamen ĉe unu aspekto la pozicioj ne vere estis kontraŭaj. Ĉiuj, ankaŭ Trabant, ne vidis alternativon al la angla kiel interkomunika lingvo kaj tial favoris plifortigitan instruadon de la angla. La lingvan diversecon Trabant opiniis kulturaĵo, la aspekton de lingva justeco li ne menciis. La temvorto de justeco kontraŭe venis de Gerhards, sed kun la argumentado, ke pli da angla, ekz. en la Infana Kanalo de televido, malhelpu, ke malpli kleraj homgrupoj estos apartigataj de la internacia mondo. Gahler ĉe tiu punkto fokusis nur la konkuradon de la germana kontraŭ la franca.

Ĉe la demandoj el la publiko du ESF-membroj partoprenis. Precize demandite pri Esperanto la diskutintoj unuanime opiniis, ke ĝi estas senŝanca, ĉar ne estas potenco malantaŭ ĝi. Trabant iam pledis por la latina, sed ankaŭ por tio ne vidis ŝancon. La alia demando koncernis kiel trakti la avantaĝan pozicion de gepatralingvuloj de la angla. Gerhards proponis financan rekompencan en EU, sed samtempe ne vidis grandan ŝancon efektiviĝi ĝin. La aliaj respondis simile.

RP



„Mi petas pardonon. Kiun lingvon vi parolas?“  
„Kompreneble mi broken EŬnglish.“

## geburtstage im juni

## naskiĝtagoj en junio

Dr. Wolfgang Schwanzer, 05.06.

Joop Eggen 16.06.

Franziska Reisel, 17.06.

ni gratulas!

## geschenk aus lyon

## donaco el liono

Lyon und Mailand sind die Partnerstädte Frankfurts und unsere Klubs tauschen regelmäßig die Bulletins aus. Mit dem letzten „Rhône espéranto“, Bulletin aus Lyon haben wir auch die Übersetzung eines Gedichtes aus Esperanto in Französisch bekommen. Das hat die Gruppe gemacht. Wir möchten dieses Gedicht hier allen unseren Mitgliedern und Freunden zu Verfügung stellen.

Liono kaj Milano estas ĝemelaj urboj de Frankfurto kaj niaj kluboj interŝanĝas la informilojn. Kun la lasta „Rhône espéranto“, la informilo el Liono, ni ricevis ankaŭ la tradukon de poemo el Esperanto en la franca. La tradukon faris la Esperanto-grupo. Ni deziras doni ĉi tiun poemon al la dispono de ĉiu el niaj membroj kaj amikoj. Ni gratulas kaj dankas por la donaco.

ke

### Un cactus et un lézard

Un cactus poussait  
dans le désert  
vint à lui  
un lézard.

Poŭrquoi, cactus,  
Diable!  
pousses tu  
dans le sable?

Le cactus répondit  
„Tonnerre!  
Pour que tu dormes,  
toi, à l'ombre!“

*Des hommes se sacrifient,  
pour que d'autres reçoivent...*

tardukis membroj de CERL (Francio)

Ŝtefo Urban war ein tschechischer Komponist und Musikpädagog. Kurz nachdem er Esperanto gelernt hat, hat er angefangen, in Esperanto zu schreiben. Er schrieb Novellen, Artikel, satirische Gedichte. Er komponierte auch Musik für die Werke anderer Esperanto-Dichter.

Er schrieb auch mehrere Lehrbücher über Musik.

Seine erste Frau war Eli Urbanova, auch eine bekannte Esperanto-Autorin.

### Kakto kaj lacerto

Kreskis Kakto  
en dezerto,  
venis al li  
la Lacerto.

„Kial, Kakto,  
pro diablo,  
kreskas vi ja  
en la sablo?“

Kakt' respondas  
„Fulmotondro!  
Por ke dormu  
ci en ombro!“

*Kelkaj homoj sin oferas,  
al aliaj multon peras...*

Ŝtefo Urban (1913-1974)

Ŝtefo Urban estis ĉeĥa komponisto kaj muzikpedagogo. Mallonge post sia esperantiĝo li komencis verki en Esperanto. Li skribis novelojn, artikolojn, satirajn poemojn. Li komponis ankaŭ muzikon por la versaĵoj de aliaj Esperanto-poetoj.

Li skribis plurajn lernolibrojn pri muziko.

Lia unua edzino estis Eli Urbanova, ankaŭ konata Esperanto-poetino.

